



TEA-BULTENO

13^A JARO

NOVEMBRO - DECEMBRO 2010

NUMEROJ 11-12

Kiam la popoloj povos interkompreniĝi, ili ĉesos malami unu la alian.
Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917)

Al la legantaro

Tiu ĉi estas la lasta bulteno kiun vi ricevos en ĉi 2010^a jaro. Jes, ĉepordas la nova Jaro 2011^a kaj rapidrapide ni agitiĝos dum ĉi lastaj monatoj, por realigi la projektojn, jam pripensitajn komence de la nuna jaro. "Ho, kiel fulme pasas la tempo!" jen tiu gurde dirata frazo ankaŭ mian menson trasagas. Sed, diable! veras tiu diraĵo, ĉar ankoraŭ multon oni devas aranĝi, dum tempo malmultas.

Skize kaj koncize mi atentigas vin pri la lastaj aferoj, okazontaj en Triesto, ĉiuj koncentritaj en decembro: bonvolu prinoti la datojn, ĉar se vi mem ne engaĝiĝos en ilia realigado, do almenaŭ per via ĉeesto subtenu la laborantojn.

De la 6^a ĝis la 20^a de decembro: Ekspozicio de ellaborajoj de geknaboj el la tuta mondo, partoprenintaj en la 4^a Internacia Kristnaska Konkurso 2010. Ĝin oni ekmuntos en la ĉefa enirhalo de la Komerca Centro 'Il Giulia' (Via Giulia 75) dimanĉe la 5^{an} de decembro. Temas pri ĉirkaŭ 200 desegnaĵoj/rakontoj aŭ poeziaĵoj. **Inaŭguro lundon la 6^{an} je la 11^a horo.** Plej probable, dum la inaŭguro, prezen-

tos la Virinvoĉa Ĥoro 'Ivan Grbec' kelkajn kristnaskajn kantojn en diversaj lingvoj.

Mardon la 14^{an} de decembro: ĉe la Teatra Salono Beethoven (Via Coroneo 15, 2^a et.) **je la 18^a horo,** M^o Severino Zannerini prelegos pri Pinokjo kaj rakontos ankaŭ pri sia kolektaĵo, kiu konsistas el miloj da pecoj, ĉiuj koncerne la faman marioneton. Krome la triesta ĥoro 'Coro Lions Singers' de li direktita kantos kelkajn muzikaĵojn ĉiam pri lia tre ŝatata temo. Senpaga eniro, ĉiuj bonvenas!

Superfluas, ke mi atentigu vin pri la bezono ricevi helpon, por ke tion ni realigu kiel eble plej bone kaj taŭge, ĉu ne? Oni devas pretigi la panelojn kun la desegnaĵoj aŭ rakontoj, skribi nomojn, traduki, prepari invitilojn, broŝurojn pri la okazaĵo, afiŝetojn propagandajn kaj simile, kaj preskaŭ la samon ankaŭ por la programo kun M^o Zannerini. Ĉiun ajn kontribuon ni volonte akceptas, eĉ nur moralan subtenon kaj, kompreneble, personan ĉeeston!

Kaj lastaj vortoj, kiujn mi direktas al la tuta legantaro, estas: "Bonan jarfinon kaj, ĉefe, multe da sano, feliĉo kaj sukceso en la venonta jaro, kaj ... ĉiam antaŭen por kaj per Esperanto!" *Via Flida*

Premio ZAMENHOF e Premio UMBERTO STOPPOLONI

Giovedì 18 novembre (h. 21.00) si terrà ad Ancona, presso il teatro sperimentale 'L. Arena' (via Redipuglia 57), la cerimonia di premiazione dei premi ZAMENHOF - LE VOCI DELLA PACE e UMBERTO STOPPOLONI - LE INTEGRAZIONI IMPOSSIBILI. La manifestazione, giunta all'ottava edizione, gode del Patrocinio della Regione Marche, Provincia e Comune di Ancona, e del Museo Tattile Statale 'Omero'.

Il Premio Zamenhof è nato nel 2002 con l'intento di dare risalto a iniziative e modelli di vita di persone impegnate in campo umanitario e, in secondo luogo, di offrire una più profonda conoscenza del Movimento Esperantista attraverso i suoi valori fondanti: la pace, la solidarietà tra i popoli, il rispetto per tutte le lingue e tutte le culture.

Quest'anno i vincitori del premio, a cui sarà assegnata la scultura bronzea 'La Vojaĝisto' del m.o Floriano Ippoliti, sono:

- ★ NICCOLO' FABI, cantautore impegnato in iniziative in campo scolastico e sanitario in Africa (Sudan, Angola);
- ★ prof. ROCCO ALTIERI, docente di Teoria e Prassi della Non Violenza presso l'Università di Pisa, sostenitore della pedagogia della pace e della non violenza come intellettuale e come cittadino;
- ★ SUOR MARIA PIA DA RECANATI, Superiora per l'Italia Centro-settentrionale delle Missionarie della Carità, fondate da Madre Teresa di Calcutta ed operanti nel mondo per alleviare le sofferenze di chi vive la malattia e la povertà in contesti di emarginazione e di miseria.

Il Premio STOPPOLONI - gemello del premio ZAMENHOF - è ispirato alla figura dell'omonimo celebre esperantista e, allo stesso modo, si propone di far conoscere ed aiutare operatori sociali e culturali meno conosciuti, ma capaci di incidere profondamente in alcune realtà sociali. Il vincitore di quest'anno è l'Associazione INSENSINVERSO, che opera nel quartiere romano della Magliana per l'integrazione delle diverse etnie attraverso l'insegnamento della lingua italiana.

La cerimonia si chiuderà con il concerto del pianista Marco Vergini, che suonerà musiche di Schumann, Chopin, Liszt e Debussy.

Per eventuali prenotazioni alberghiere rivolgersi a Daniela Bottegoni, 339/8007222.

Interesan eseon pri la vivo de la fama esperanto-pioniro **Achille Tellini** (vd. pĝ. 5^a, TEA-Bulteno Majo-Junio 2010) disponigis al mi lia pranepino Lidia Testoni, kiu de multaj jaroj esploras pri sia familio kaj ĉefe pri la vivo kaj verkoj de Achille, stimulita de la rakontoj kaj dokumentaro transdonitaj al ŝi de la avino. Hodiaŭ ŝi posedas rimarkindan arkivon, plejparte konservitan en cifereca formato. Lidia, post magistriĝo pri Artoj, Muziko kaj Spektaklo, specialiĝis pri biblioteka kaj bibliografia teknikaranĝado, avangarda do-



kumentado, informada teknologio kaj jura informadiko. Ŝi publikigis eseojn precipe pri historiaj temoj. Interalie aranĝis plurajn ekspoziciojn,

la plej lastan "1909-2009 Cent jaroj de esperanto en Bolonjo", per kiu ŝi memorigis la unuan esperantotelmontraron organizitan en tiu urbo.

ACHILLE TELLINI

RESKRIBI TIES HISTORION KAJ VERKON

LA UNUA KONTRIBUO: INTERESIĜO PRI KAJ
AKTIVADO POR ESPERANTO

Ja skribite kaj implicite en ĉiuj liaj biografioj estis, ke Achille Tellini forte sindediĉis al esperanto, ekde sia translokiĝo de Udine, la tre amata naskiĝurbo, al Bolonjo, kiun li elektis kiel sian rezidejon dum pli ol dudek jaroj. Veras, ĉe la lumo de elserĉoj kiujn mi estas faranta pri vivo kaj verko de Tellini, ke nenion oni povas konsideri jam konata kaj jam multaj estis la surprizoj kiuj puŝis min ree kontroli, kion ĝis nun oni supozeble jam scias aŭ kion oni skribis pri li.

La unua, kiu rakontis al mi pri Achille, estis Adria, mia avino laŭ patrino flanko, unu el liaj filinoj, unu el tiuj kvar ĉarmegaj 'fraŭlinoj Tellini'. Achille, fakte, estis mia praavo kaj, tra la ofte fabelaj priskriboj de Adria, eniris dolĉtrudiĝe en mian imagkapablon de infanino.

Poste, plenkreskaĝe, pro mia emo al esplorado kaj dokumentado, ekestis firma volo malkovri, kiu reale estis tiu homo.

Ne estis, kaj ankoraŭ nun ne estas, facile trovi la plej rektajn kaj verajn fontojn lin koncernantajn. Ne nur ĉar li estis tre decidema persono, kvankam evitema; ne nur ĉar pro siaj ideoj kaj pasioj plurfoje li devis alfronti suspektojn, denuncojn, eĉ anonimajn akuzojn, inkviziciojn kaj policajn kontrolojn; ne nur ĉar dum la faŝisma periodo li plue estis persekutata kaj izolita, mokita kiel freneza idealisto, sed ankaŭ ĉar la varieco kaj interplektiĝo de liaj interesoj instigis al pli profunda studado en plej diversaj kampoj de scio kaj faro.

Direndas krome, ke ĝuste pro la apartaj travivaĵoj spertitaj de Tellini, li ofte estis eldoninto de si mem kaj foje preferis publikigi siajn skribaĵojn, dividante ilin en kajerojn, por ilin cirkuligi kaj distribui kiel periodaĵojn. Do, tial ne facilas kunmeti la verkaĵojn, sed tamen por kiel eble plej kompletigi lian vastegan bibliografion, esencas kompreni

la evoluon, la interplektaĵojn kaj la valoron de liaj studaĵoj, de lia kultura kaj socia engaĝiĝo.

Achille, naskiĝinta februare 1866 en Udine, estas instigita de la patro al studado. En 1881, dekkvinjarulo, li iĝas membro de la Friula Alp-Societo, kies fondiĝon la familio notinde subtenis kaj kies vicsekretario estis la pli aĝa frato Edoardo. En tiu sama jaro la patro Gio. Batta – laŭ la dokumentoj en la komunuma registrejo de Udine (1865) – publikigas la "Ilustraĵoj pri la Dia Komedio"-n. Gio. Batta estas, kune kun la fratoj Carlo, Angelo kaj Antonio, komercisto, monŝanĝisto kaj bienulo. Sed li estas ankaŭ aŭtodidakta Dante-studemulo, pasia kaj aktiva skermisto kaj fakulo pri friulaj historioj kaj tradicioj.

Du jarojn poste, en 1883, Achille diplomigis ĉe la Reĝa Liceo en Udine. Ne nur: dum la ĝenerala kunveno de la itala geologia societo, la 18^{an} de marto 1883, Achille Tellini estas proklamita membro inter la novaj anoj sekve de propono de Giovanni Capellini kaj Giulio Andrea Pirona (gravas memorigi, ke la Itala geologia Societo estis fondita en Bolonjo en 1881). Sur la paĝoj de 'Cronache' (Kronikoj), eldonitaj de la Friula Alp-Societo, Achille estas difinita 'dilektanto pri scienca alpiismo'. Sed post kelkaj monatoj lia amo pri natursciencoj, kiun la patro kune kun la tuta familio zorge flegis, transformiĝos al totala sindediĉo, al konstanta kaj viva engaĝiĝo. La 24^{an} de oktobro 1884 li enskribiĝas en la Fakultato pri matematika, fizika kaj natura sciencoj en Torino. En 1888 li magistriĝos pri Natursciencoj.

Liaj instruistoj, dum tiu kurso daŭrinta 3 jarojn kaj naŭ monatojn, estis: Andrea Naccari (pri fiziko), Michele Fileti (pri ĥemio), Giorgio Spezia (pri mineralogio), Michele Lessona (zoologio), Alessandro Portis kaj Federico Sacco (paleontologio), Lorenzo Camerano (kompara embriologio), Giulio Bizzozero (histologio), Martino Baretto (geologio), Angelo Mosso (homa fiziologio), Carlo Giacomini (homa anatomio), Giuseppe Gibelli (botaniko), Oreste Mattiolo (sistema botaniko). Liaj rilatoj kun la profesoroj certe estis striktaj kaj kunlaboraj se, fine de la eseo 'Aldonoj al tera malakologio en Piemonte', Carlo Pollonera (pentristo, disĉiplo de Fontanese kaj specialisto pri malakologio) dankas Tellini-n, kune kun Sacco, Camerano kaj Piolti, pro la tiutema materialo al li disponigita (Bulteno de Muzeoj pri zoologio kaj kompara anatomio de Reĝa Universitato en Torino, 1886).

Rimarkindas, kiel kelkaj el tiuj docentoj kaj elstaraj profesoroj estis krome socie kaj politike engaĝitaj. Michele Lessona, adepto kaj tradukisto de Darwin, senlaca scienc-disvastiganto, postenis en Torino kiel komunuma konsilanto dum multaj jaroj (1877-1895) kaj kiel membro de la Supera Konsilio pri publika instruado. Giulio Bizzozero, famkonata kiel patro de la itala histologio, membro de la Supera Konsilio pri sano kaj de tiu pri publika instruado, estis regna senatano kaj en la Parlamento batalis por solvo de la enlanda sociala kaj sana problemaro.

Krome li estis elstarulo en movado nomita 'filantropia socialismo de profesoroj' kaj, kiel Lessona, perceptis kaj riĉigis propran rolon de scienc-

ulo per intensa disvastiga aktivado, precipe rilate novajn konceptojn pri higieno kaj socia medicino. De Angelo Mosso, kiu same eniris Parlamenton kiel senatano, tre bone konatas la studoj pri fiziologio de fizika edukado por virinoj kaj infanoj. Li estis unu el la ĉefaj favorantoj de enkonduko de fizika edukado kiel deviga fako en privatajn kaj publikajn instruejojn. Aldonendas, ke multaj el la docentoj de Achille estis pasiaj esploristoj kaj alp-istoj.

El la universitataj dokumentoj de Achille kaj sek-vaj atestoj, de li akiritaj kelkan tempon post la magistriĝo, evidentiĝas ke li ne nur vizitis lecionojn de sia kurso, sed antaŭ tiujn pri kompara anatomio, zoologio kaj botaniko en la naturscienca sekcio de Instruista Seminario, kunligita kun la fakultato pri matematika, fizika kaj naturaj sciencoj. Do, en tiutempa Torino, centro de itala pozitivismo, Achille rilatis kun la plej elstaraj reprezentantoj de scienca kaj teknika kulturo en tiu Italio kiu estis alfrontanta profundajn ŝanĝojn, pro agrara krizo kaj ekindustriiĝo, demografia pliiĝo kaj pligrandigo de balotrajto, laboristara lukto kaj amasa elmigrado.

Ne forgesendas la ĝenerala Ekspozicio, kiu sidejis en Torino, ĝuste en 1884: ĝi iel kontribuis, ke, malgraŭ la perdo de sia rolo kiel regna ĉefurbo, tiu urbo sin proponu kiel centron de industria, socia kaj intelekta disvolviĝo naci- kaj internacivele.

En Torino la interesoj de Achille plinombrigaĵas kaj difiniĝas aŭ eble, pli bone, trovas konfirmojn kaj eblojn al evoluo. Li, ĉefe, ne estas malsentema fronte al sociaj temoj: en Torino li aĉetas kaj legas, franclingve, kelkajn el la plej gravaj verkoj de Pierre-Joseph Proudhon kaj Herbert Spencer. Tiu torina periodo do iĝas decida por lia elformado, ne nur pro la pliaj horizontoj malfermiĝontaj sekve de la universitata studado, sed eĉ pli pro la legaĵoj, la vizitoj kaj la oportunoj realigi kaj plisolidigi konatiĝojn kaj rilatojn.

Ĝuste tie Achille alproksimiĝas al la problemoj de universalaj helplingvoj. Li ne iĝas tuj esperantisto. Antaŭe li deziras plene koni la ekzistantajn proponojn kaj nur pli poste decidas elekti esperanton. Pri ĉi tiu lia decido oni trovas ateston en letero, de li skribita la 1^{an} de julio 1907 al la torina matematikisto Giuseppe Peano. En la letera teksto, post analizo kaj komparo kun historiaj kaj bibliografiaj donitaĵoj, klare legeblas la interesiĝo de Achille pri la internaciaj lingvoj.

Unue oni devas diri, ke Achille konscias, ke Peano jam de pli frue estas tre sentema rilate la proble-

mon trovi taŭgan internacian lingvon inter la diversaj proponitaj. Fakte Peano aktive partoprenis en Kongresoj pri matematiko kaj filozofio en Parizo (1900), kie li renkontiĝis kun Louis Couturat. Pli poste, en 1903, li publikigis eseon pri 'Latino sine flexione'. Eĉ Achille, en konata cirkulero kun dato de la 30^a de junio 1907, jam enskribis la nomon de profesoro Peano inter tiuj de aliĝintaj italoj: per tiu cirkulero oni apelaciis al la Komisiono pri alpreno de internacia helplingvo, kies reprezentanto estas Tellini mem.

Fakte li demandas al la profesoro, ĉu eblas ricevi el Torino iujn novajn nomojn subskribontajn la apelacion kaj, krome, eĉ komenci interŝanĝon de publikigaĵoj, precipe por pli bone koni lian 'latino sine flexione'-on. Tiuteme Achille skribas: "Kvankam mi estas Esperantisto, tamen mi estas tute senpartia rilate al sistemoj de mi konataj. Estas de mi jam konataj 'Universal' aŭ 'European', 'Neutral' kaj 'Nov Latin' de Rosa, kiun mi vidis - se tiel diri - eĉ naskiĝi sub miaj okuloj kiam mi estis studento en la Universitato de Torino kaj vizitadis la zoologian kabineton kie laboris prof. Rosa. Mi ŝatus koni vian 'Latino Sine Flexione'-on kiun tre ofte oni citas eksterlande (Belgio), dum ĉe ni malfacilus ekscii ion pri ĝi, krom se oni konsultus la memuaron enmetitan en Akademion, kies bibliografia indiko nur hieraŭ malkaŝiĝis antaŭ miaj okuloj".

Kroma konfirmo de la intereso, kiun Achille Tellini, intense kaj konstante, dediĉis, ekde la universitataj jaroj en Torino, al la internaciaj lingvoj, troveblas ĉe la urba Biblioteko de Udine, kie konserviĝas kopio de broŝureto de Daniele Rosa 'Le Nov Latin - International Scientific Lingua. Super natural bases', kiun Rosa publikigis en Torino, 1890. Surkovrile rimarkeblas la stampo, kiun Tellini uzis sur siaj libroj, konsistantaj lian riĉegan bibliotekon: supre la simbolo de geologio (du krucigitaj marteloj), la skribaĵo 'Dott. Achille Tellini' kaj sube 'Udine'.

Tiu broŝureto, dekpaĝa, estas eltirita el 'Bulteno de Muzeoj pri komparaj Zoologio kaj Antropologio' de la Reĝa Universitato en Torino (oktobro 1890). En 1890 Achille estas en Romo, rekonfirmita, per ministeria dekreto, kiel asistanto ĉe la Kabineto pri Geologio en la Reĝa roma Universitato.

Lidia Testoni

(Trad. Elda Doerfler)

Dankon pro la kunlaboro al: Urba Biblioteko 'V. Joppi' en Udine, Ŝtata Arkivejo de Udine, Ŝtata Arkivejo de Respubliko S. Marino, Historia Arkivejo de Studuniversitato de Torino, CDT en Cuneo.

ESPERANTO E DARWINISMO LINGUISTICO

Eblas legi ĉe <http://esperanto.torino.it/nova/?p=515> la artikolon pri la prelego "Esperanto kaj lingva Darwinismo", farita de prof. Pennacchietti la 4^{an} de oktobro ene de TEDxTorino, ĉe la Politecnico de Torino.

TEDxTorino estas programo pri mem-organizitaj eventoj, kiu periode kunvenigas interesitojn por kundivido de 'ideoj kiujn indas disvastigi'. Tiu programo estis ĝuste pripensita por doni la eblon stimuli dialogon naci-nivele tra lokaj ekzemploj. Kadre de tiuj 'ideoj', inter intervenoj pri libera komputila programaro, novaj aspektoj de turismo kaj piemonta 'rapidmanĝo', ne povis manki esperanto. Tial la prelego de prof. Fabrizio Pennacchietti pri "Esperanto kaj lingva Darwinismo": li alfrontis la paralelismojn inter darwinismo, kiu donas regulojn al la evoluo, la superecon de la 'plejfortulo' kaj la principon pri supervivo de lingvoj.

En periodo de obstinega konkurenco, kiu kondukas al formorto de la plej malfortaj lingvoj, esperanto sin proponas kiel etika lingvo, kiu, flankante la naciajn lingvojn, superas la problemojn pri konkurado.

Laste trovi taj!



En 1911 aperis poŝta karto por diskonigo de la 1^a Nacia Kongreso de Francaj Esperantistoj - Lyon'. Ĝin desegnis grafikisto Jean Robert, kaj per tio komenciĝis lia kontribuo precipe en la kampo de karikaturoj esperantistaj.

Antaŭvide de la 10^a UK okazanta en Parizo, 1914, la Esperanta Oficejo de Alice-Leontine Farges, en Lyon, iniciatis la eldonadon de 33 poŝtaj kartoj kun

karikaturaj de tiamaj konataj esperantistoj. S-ino Farges estis profesia eldonisto, tial abunda estis la eldonado de tiu Oficejo, ŝi iniciate. Krom tiuj en aŭ pri Esperanto, ŝi publikigis turismajn kartojn, ĉefe pri Lyon, sed ankaŭ specialajn kartojn por soldatoj. Sed ni revenu al la karikaturoj kartoj: tiujn oni eldonis kaj disvendis en jaroj 1912-1913 kaj la bildoj estas aŭ blankaj-nigraj aŭ mane farbitaj. La karikaturoj estas personoj, francaj aŭ alilandaj, ĝenerale internacie konataj sed en kelkaj kazoj nur regione. Pri la grafikisto bedaŭrinde nenion oni scias, nur ke li multon laboris, ne nur por s-ino Farges, en la 1910^{aj} kaj 1920^{aj} jaroj.


Jen informoj pri unu el tiuj kartoj: ĉi suba reprezentas la francan Maurice Rollet de l'Isle, kiu naskiĝis en Parizo, en 1859 (do, samaĝulo de nia LLZ!) kaj tie mortis en 1943. Profesie, li estis hidrografista ĝenerala inĝeniero de franca maristaro, kaj ankaŭ direktoro de la Centra Hidrografista Oficejo en Parizo. Li faris multajn mapojn de nordaj kaj okcidentaj marbordoj de Francio, scienca vojaĝon al



Martiniko post erupcio de Monto Pelée (1902), kaj estis krome prezidanto de la fizika oceanografia sekcio de Nacia Komitato pri Geodezio kaj Geofiziko (1923-29). Do, grava personeco. Rollet de l' Isle esperantistiĝis en 1903. Ekde tiam li vigle laboris por esperanto: iĝis prezidanto de la landa Societo pri Propagando de la lingvo, prezidanto de Pariza grupo, kunorganizanto de la 10^a UK (kiu bedaŭrinde ne estis okazinta pro la eksplodo de la

1^a mondmilito), Lingva Komitato ekde 1909 kaj, pli poste, prezidanto de la Akademio (1933). Li multon redaktis propagandecoj, speciale por diverstipaj fakuloj: komercistoj, instruistoj, eĉ por deputitoj kaj senatanoj. Do, multflanke ege merita samideano, kiu longatempe kaj multe kontribuis al disvastigado de la internacia lingvo.

Kaj nun pri Carlo Bourlet, kiu naskiĝis en Strasburgo en 1866 kaj mortis en Annecy decembre de 1913, pro akcidenta engluto de fiŝosto. En 1870 lia familio translokiĝis al Parizo, kie li studis kaj iĝis profesoro pri mekaniko. Fama kaj klera matematikisto, li verkis multajn kursojn pri aritmetiko, algebro kaj geometrio kaj pli ol dudek verkojn pri puraj kaj aplikitaj matematikoj. Pri



esperanto li ekinteresiĝis sekve de insista varbemo de prof. Méray, en 1900. Li tuj ekagis, instruante la lingvon, eĉ en la salonoj de la prestiĝa franca societo 'Touring Club'. Estis li kiu sukcesis doni grandan elanon al la esperanto-movado en Francio kaj ekrilatis kun la eldonejo Hachette. Ekde 1902, sekve de nombraj paroladoj kaj kursoj, li sukcesis fondi 19 novajn grupojn en urboj de la provinco. En 1906 ekeldonis 'La Revuo'-n, kiun longe li direktis. Neimageble aktiva kaj laborema li estis: unuvorte li dediĉis al esperanto pli ol duonon de sia vivo. Lia abrupta kaj tute neatendita morto estis grava bato por la franca kaj internacia movado.

Zamenhof diris ĉe lia tombo: "Oni multe laboris por E ankaŭ antaŭ Bourlet, sed de la momento, kiam li aliĝis al nia anaro, en nian aferon enverŝiĝis ia nova energio. Al lia senlaca iniciatado, instigado kaj helpado ni ŝuldas grandan riĉiĝon de nia literaturo kaj aperon de plej gravaj verkoj pri kaj en nia lingvo; al lia iniciato kaj energia laborado ni ŝuldas la fondiĝon de gravaj institucioj, kiel ekzemple la 'Internacia Scienca Asocio'."

Tiuj ĉi kartoj estas tre interesaj kaj laŭ historia kaj laŭ grafika vidpunktoj, ĉar plene respegulantaj la pensmanieron tiuepokan, sed samtempe ili estas absolute aktualaj. Substrekindas krome la fakto, ke jam tiam oni kapablis ironii pri si mem, oni toleris ridindigon, kaj tio atestas maturiĝon de 'la esperantista popolo'. Ĉar moki sin mem signifas ankaŭ rekoni proprajn limojn, proprajn difektojn, konsciigi pri siaj ekstravagancoj, pri malfortaj ecoj kaj, ankoraŭ, tiu memironio permesas iel demonstri al aliaj, ke fine oni ja havas plenan memfidon, ĝuste ĉar oni bone konas kaj kapablojn kaj limojn. Tiuj ĉi estas la esencaj kaj firmaj punktoj kiujn oni ĉiam devas teni antaŭokule, por iri antaŭen, rekte al la celo.

Plena Ilustrita Vortaro en la reto!

E@I nun lanĉas donac-kampanjon por kolekti bezonatan sumon: 10.000 €. Se vi opinias la retan PIV subteninda iniciato, ni petas vin helpi ĝin konstrui. Kaze de sukcesa kampanjo la retejo aperos jam ĉi-jare. Unu el la plej famaj E-verkoj de lastaj jardekoj certe estas 'Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto', mallonge PIV. La organizo Edukado@Interreto (E@I <http://www.ikso.net>) kunlabore kun Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT - www.satesperanto.org) intencas krei retan kaj senpagan version de la fama PIV. Por tiu celo estis jam subskribita kontrakto, laŭ kiu E@I kreas la retejon kaj SAT disponigos la enhavon, nome la PIV-an elektronikan version.

Jam multajn jarojn PIV estas la plej ampleksa difin-vortaro en Esperanto, sed bedaŭrinde pro sufiĉe granda kosto la papera eldono ĝis nun estis havebla nur por relative malgranda grupo de Esperanto-parolantoj. Post apero de la reta versio la situacio tute ŝanĝiĝos, la vortaron povos uzi tute senpage ĉiuj dezirantoj, kiuj havas aliron al la interreto.

La adreso de la nova projekto estos www.vortaro.net. Ĝis apero de PIV ĉe tiu ĉi adreso, ĉi tie vi povos trovi ĉiujn bazajn informojn pri la projekto kaj eblon finance kontribui al ĝi.

La projekto de reta PIV havas pli altajn ambiciojn, ol esti nur simpla cifereca versio de la papera eldono. Ĝi havas pli grandan potencialon, kiun la kreantoj de la retejo volus plene eluzi. La retejo havas forumon por ĉiu unuopa vorto, kiu ebligos vizajn diskutojn pri diversaj terminoj. Ĉiu povos kontribui, proponante eblajn novajn esprimojn, taŭgajn uzajn de certaj vortoj ks. Laŭ la plano la retejo estos uzebla ne nur per komputiloj, sed ankaŭ per poŝtelefonoj. Estonte plejverŝajne eblos aranĝi, ke la vortaro estu utiligebla ankaŭ ekster la reto, kiel instalebla programo. Ĉu vi ŝatus havi PIV-on en via poŝto? Vi povas helpi realigi tion!

Eblas plurmaniere monkontribui al realigo de ĉi projekto, kiel, ekzemple, pagi al PayPal-konto de E@I - al retpoŝtadreso >financoj@ikso.net< aŭ al UEA-konto de E@I: ecxi-v. Pliaj informoj troveblas rete. Se pago estos perreta, sekvu la klarigojn. Listo de la kontribuantoj aperos en la retejo de PIV mem, same en la retejoj de E@I kaj SAT. Se vi havas komentojn, ideojn aŭ dezirojn pri la projekto, bv. kontakti la teamon de la projekto: teamo@vortaro.net

Facenda-Escola Bona Espero

Ampleksa incendio detruis grandan parton de la teritorio de Bona Espero, la esperantista orfejo en Brazilo. En letero sendita al subtenantoj de la projekto, la esperantistaj estroj de la orfejo, Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, rakontas pri la okazaĵo:

"La fajro komenciĝis sabaton, la 18^{an} de septembro, posttagmeze, alvenanta el distanco de ĉirkaŭ 15 km el la nordo. Ni jam estis preparintaj defendan zonan per nia traktoro ĉirkaŭ la plantaĵoj kaj domoj. La fronto estis kilometrojn larĝa kaj la funkciuloj de la Nacia Parko klopodegis jam la tutan posttagmezon haltigi la fajron je dek km de ni. Ni restis vekaj dum la tuta nokto. La fajro alproksimiĝis senhalte kaj, je la 2^a h. frumatene, atingis nian teritorion.

Bona Espero posedas 943 hektarojn da nefertila savana grundo, sed riĉa estas la bieno pro endemiaj specialaj plantoj kaj multaj bestoj, kiel jaguaroj, simioj, cervoj, lupoj, dazipoj, serpentoj divers-tipaj, emuoj, kaj multaj specioj de papagoj, araoj, tukanoj kaj aliaj birdoj. Fakte nia teritorio estis parto de la najbara fama nacia parko kun dekoj da akvofaloj, kiun vizitas daŭre turistoj, sed, pro nia socia servo al sep urbetoj de la regiono, la ŝtatprezidanto faris specialan dekreton, eltirante nian areon el la parko, jam en 1981 pro niaj petoj. Pro tio ĝi nin ĉirkaŭas je tri flankoj. Ni fakte ne rajtus modifi per konstruaĵoj aŭ grandaj monokulturoj la medion, kiu ĝis 10 km de la park-limoj estas protektata areo.

Do, la fajro atingis nin en kelkaj lokoj ĝis 10 metroj de la domoj, sed en aliaj areoj ni sukcesis per kontraŭfajro bari la alvenon. Tion ni sukcesis per la helpo de pluraj ekslernantoj, kiuj alvenis nokte je la 3^a horo, vidinte de 6 km la fajron ĉe ni. Dum la nokto la laborantoj kune kun la infanoj provis haltigi la fajron ĉe vojo, por savi la konstruaĵojn..." "... Feliĉe ni sukcesis. Sed 90% de la tuta teritorio de Bona Espero, inkluzive de ĉiuj najbaraj grundoj, brulis..."

La prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, en mesaĝo sendita al la retpoŝta listo de UEA-membroj, alvokis ĉiujn laŭeble doni financon subtenon al Bona Espero, por ripari la damaĝojn.

Ursula, Giuseppe kaj ilia granda familio sin adresas ankaŭ al tiuj, kiuj jam konas la projekton Bona Espero kaj scias pri la profunda valoro por la bonfarto de Esperanto kiel ideo en la reala mondo kaj pri la ŝvito de sindonaj homoj el la esperantista mondo, konstruinta kaj savtenanta tiun ĉi unikan kunlaboradon, kun fido kaj espero je helpo, por ke laboro de pli ol 35 jaroj ne forvaporiĝu kiel la akvo disŝprucigita sur tiun fajregon.

El artikoloj en Libera Folio, kaj de Ret-info. Legu pli ĉe la jenaj ttt-ejoj:

www.liberafolio.org/2010/granda-fajro-en-bona-espero
kaj www.liberafolio.org/2010/bonespero,

el kiuj oni ekscios ankaŭ kiamaniere entute tio okazis kaj kiel solidarece helpi. Pri historio de Bona Espero legu ankaŭ ĉe Vikipedio:

http://eo.wikipedia.org/wiki/Bona_Espero

Pensoj de Laura

Paco: nerealigita sur tero nek hodiaŭ nek morgaŭ!
Se en la ĝardeno de via koro kultivos vi semojn de humileco kaj grandanimo, burĝonos en vi la fruktoj de 'Paco'.

PACO! Paco devas nesti en vi kaj ene de ni ĉiuj, ĉar sen interna PACO, ekzistas nek ekvilibro nek harmonio!

Sen PACO - ne eblas kreivo

Sen PACO - ne eblas scivolemo, kiu kondukas nin al malkovro kaj de la materio kaj de l' animo

Sen PACO - forestas sereno

Sen PACO - forestas ĝojo

Sen PACO - forestas amo

Sen AMO - mondo pereas.

PACO estas vivo!

Novembra Programo	
2 mardo	17h00 - Posttagmezaj kursoj
5 vendredo	20h00 - Estontaj programoj
9 mardo	17h00 - Posttagmezaj kursoj
12 vendredo	20h00 - Preparlaboroj por la Kristnaska ekspozicio
13 sabato	10h00 - Museo Postale e Telegrafico della Mitteleuropa - Piazza Vittorio Veneto 1 - Visita guidata (itale) di R. Toderò: Al servizio dell'umanità - Cani della sanità e da lavoro dell'esercito austro-ungarico Sinanoncoj ĉe TEA
16 mardo	17h00 - Posttagmezaj kursoj
19 vendredo	20h00 - Preparlaboroj por la Kristnaska ekspozicio
23 mardo	17h00 - Posttagmezaj kursoj
26 vendredo	20h00 - Preparlaboroj por la Kristnaska ekspozicio
30 mardo	17h00 - Posttagmezaj kursoj
Decembra Programo	
1 mardo	17h00 - Posttagmezaj kursoj
3 vendredo	20h00 - Preparlaboroj por la Kristnaska ekspozicio
5 dimanĉo	Muntado de la ekspozicio ĉe la Komerca Centro "Il Giulia" - informoj ĉe TEA-sidejo
6 lundo	11h00 - Inaŭguro de la ekspozicio, ĉefa enirejo de "Il Giulia"
7 mardo	17h00 - Posttagmezaj kursoj
10 vendredo	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno 20h00 - Zamenhofa Festo - rememoroj pri lia vivo
14 mardo	18h00 - Programo pri Pinokjo, zorge de M ^a Severino Zannerini, kun partopreno de "Coro Lions Singer" (Salono Beethoven)
17 vendredo	20h00 - Ankoraŭ io pri Mongolio!
20 lundo	Fermo de la ekspozicio ĉe "Il Giulia" (malmuntado)
21 mardo	20h00 - Kristnaska Festo!
28 mardo	20h00 - Adiaŭ, 2010 ^a jaro!

Jarfina divenludo de Viglo

Ju pli ni perdas ĝin, des pli ni havas ĝin.
Pri kio temas? Solvo en la venonta Tea-Bulteno.
Inter la divenintoj estos lotumita interesa premio:
ek al labor! Ne perdu ĉi ŝancon!

Eblas aĉeti jam nun, ĉe libro-servo de UEA, la glumarkojn reklamantajn la 96^{an} UK-on en Danio. Pli beligu la kovertojn de viaj korespondadoj per tiu ĉi kolora emblemo!



Tiel mi kuiras!
Kaj vi?

Triesta recepto Kristnaska
Presnitz

Pri la origino de tiu ĉi dolĉaĵo, ekzistas pluraj opinioj: iuj diras, ke deveno estas el Gorico (Gorizia), aliaj absolute el Aŭstrujo, aliaj el Slovenujo. Laŭ fama triesta kuiristo Cesare Fonda, tiu pri deveno el Aŭstrujo tute malveras, eventuala escepto estas en iuj lokoj de regionoj ĉelimaj. Plej probable ĝi originas el Slovenujo: *presenec*, diminutiva formo de *presen* (*kruh*), nome (pano) nefermentita. Fakte la kuko estas preparita per foli-pasto, kiu envolvas 'kompaktan farĉaĵon, formante kolbaseton', tiel ĝin priskiribis la fama triesta receptistino Fast, kiu interalie diras, ke el tiu kuko ekzistas pli ol mil versioj, ĉar ĉiu triesta familio faras 'sian' specialan Presnitz. Konkludas tiel la klarigojn Cesare Fonda: "Tiu ĉi dolĉaĵo estas tute aŭtentika triesta", kiun li rekomendas surtabligi por la ĝojo de amikoj kaj familianoj, speciale dum festotagoj.

Ingrediencoj:

- 400 g da folipasto (aĉetita ĉe bakisto aŭ superfrostigita)
- 100 g da sukero
- 100 g da rosinoj, trempitaj en miksaĵo el decilitro da rumo kaj decilitro el iu dolĉa vino
- 100 g da pinsemoj
- 35 g da kanditaj cedrofruktaj kaj oranĝaj pecetoj
- 100 g da erigitaj juglandoj
- duontaso da senŝeligitaj, erigitaj migdaloj
- 150 g da malfreŝa, raspita dolĉa pano (aŭ sama kvanto da sekaj biskvitoj)
- unu glaseto da rumo miksitaj kun du glasetoj da dolĉa vino

Preparado

Kunmiksi ĉiujn ingrediencojn en taŭga ujo kaj aldonu la miksaĵon de rumo kaj dolĉa vino. Prenu la folipaston kaj ĝin etendu per pastorulo, donante al ĝi rektangan formon, ĝis 2-3-milimetra diko. Surmetu la farĉon, involvu ĝin en la pasto, formante tiel longan kolbason: zorge surmetu la finan parton de la pasto sur la envolaĵo, por ke la enhavo ne eliĝu. Fermu bone kaj bordojn kaj ekstremajojn. Metu ĝin en rondan, buterumitan bakujon aŭ ankaŭ sur bakpleto, donante al la kuko spiralan formon. Ŝmiru la surfacon per ovo kirlita kun iom da varm-eta fandita butero. Baku ĝin je 220-240-grada varmo dum ĉirkaŭ 20 minutoj.



BULTENO DE TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
Tel: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@teletu.it
Grupa tt-ejo: //it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristiana
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349